

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (961) • 2023 •

La kongresa grupo ĉe la memortabulo en Tykocin

Fotis Nina PIETUCHOWSKA



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe Cousson

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de, kelI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Religio : relegado aŭ religado	75
Kongresa raporto — 72a KELI-kongreso	82
Raporto pri Ekumena Diservo dum UK	90
Vigla interesiĝo en Germana Eklezia Foiro	91
Raporto el Tanzanio	92
Invito al Bibliaj Tagoj en Neustadt	93
Informetoj: peto pri kontakto	95
Kanto: Vi vidas min, mia Di'	96

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, ĉi-numere nia gazeto kuplejparte pleniĝas per kongresaj eroj. Unue vi povos legi la enkondukan prelegon de Philippe Cousson, nia prezidanto, kaj poste vi povos legi la kongresan raporton. Espereble tiuj du artikoloj donos al vi iun ideon pri nia somera kongreso kaj ĝia etoso. Mi mem havis la eblecon partopreni kaj ĝui la interesan enhavon kaj renkontiĝon kun samideanoj. Vere inspiriga semajno. Krome vi povos legi pli mallongajn raportojn de diversaj aliaj okazaĵoj.

Inspirige estas ankaŭ, ke dum 2 semajnoj, mi havas la eblecon ĉiutage, rete konversacii kun ĉinaj gejunuloj, kiuj volas plibonigi siajn esperantan parolkapablon. Tiu konversacio samtempe montras al mi, ke mi daŭre devas praktiki Esperanton, por ke mi ne forgesu la lingvon. Bonŝance troviĝas bonaj libroj kaj intersaj revuoj, ekz Dia Regno.

Mi deziras al vi interesan legadon. ☞

Religio : relegado aŭ religado

Enkonduka prelego dum la kongreso en Bjalistoko

Philippe COUSSON, FR

1. Enkonduko:

Religio: relegado aŭ religado

Laŭdire, la franca aŭtoro André Malraux diris, ke “la 21-a jarcento estos religia aŭ ne estos”. Kvankam iu asertis, ke li diris vere tion, li neis, sed klarigis, ke se la eŭropeca civilizo ne revenas al io spirita, al vivkialo, ĝi malaperos. Sed, kio estas religio ?

Paroli pri religio simple ne eblas en kelkaj lingvoj kaj kulturoj. Eĉ dum la jarcentoj, kiam ĝi ekzistis, tiu ĉi vorto havis multajn diversajn difinojn. Ne estas nune tempo por pli profunda studo tra la historio de la nocio ene de la civilizoj. Mi do restos ĉe la nuna situacio.

Por paroli pri tiu ĉi vorto, ekzistas ĝenerale du paralelaj etimologioj, ambaŭ kun kromsignifoj. Religio kiel ĉu *relegado*, ĉu *religado*.

Religado, ĉar ĝi permesas ligojn ene de la socio, ligojn pere de sama kompreno de la mondo, ĉar ĝi institucas praktikojn, ritojn, leĝojn, kiuj permesas al la socio bone kune vivi, kaj ĉio ĉi tio en ligo kun elementoj spiritaĵaj, sanktecaj, kun alia mondo preter la videbla, distingante inter aferoj profanaj kaj aferoj sanktaj. Tamen tiu distingo ne ĉiam ĉie validas. Povas esti, ke ĉio estas kaj profana kaj sankta.

Relegado, ĉar ĝi permesas postkomprenon de la observataj faktoj, de la



Philippe Cousson, enkonduka prelego.

okazaĵoj. Ĝi estas legado de la mondo, relegado, postlegado. En tio funkcias tradicioj, legendoj, mitoj, tekstoj. Temas pri interpretoj de fenomenoj observataj. Kaj plej ofte en tiu kompreno intervenas spiritaĵaj fenomenoj, estaĵoj, kaj sekve aferoj profanaj kaj aferoj sanktaj. El tiu kompreno de la mondo ĉirkaŭa venas praktikojn, ritojn, leĝojn por bone vivi en tiu tiel komprenata mondo.

Se ekzistas tiuj ĉi du etimologioj, tiuj ĉi du komprenoj, tio signifas, ke ili fakte ambaŭ validas, kunvalidas.

2. Kio estas religio

Laŭ la religiuloj

Laŭ la sociologoj kaj filozofoj

Laŭ la ateistoj : ĉu lambastono ?

La nereligiaj religioj : ĉu Esperanto ?

La ĉefa problemo estas fakte, ĉu eblas difini, kio estas religio. Kaj la ĝenerala sento inter fakuloj estas, ke ne.

Tio varias laŭ kiu difinas, ĉu religiulo, ĉu sociologo, ĉu filozofo, ĉu kredanto, ĉu raciisto, ktp. Same ĝi varias laŭ la kultura etoso, ĉu en okcidenta mondo, ĉu en proksimorienta, ĉu en orientazia, ĉu en la triboj sudamerikaj, sudsaharaj aŭ ankaŭ aŭstraliaj.

Kiel mi jam diris, se en unu lingvo, unu civilizo, ne ekzistas la vorto, mal-facile estas universale difini ĝin, aŭ enkonduki ĝin por priskribi la tutan socian vivon.

Plej ofte religia sistemo entenas respekton al io aŭ iu sankta, supera, ĉu nomi ĝin dio aŭ dioj, spiritoj, patrino-tero aŭ io alia. Plejofte ankaŭ estas reguloj, leĝoj, ritoj, agadoj por plaĉi al la superaj estaĵoj, kaj por obteni de ili avantaĝojn, protekton kaj eĉ venkon en bataloj.

Eĉ interne de kristanismo, la difino de religio variis. La problemo pri kio estas religio akutiĝis post la Reformacio en Eŭropo. Antaŭe estis tie nur unu religio, t.e. nur unu valida religio. Kion fari kun tiuj aliaj kristanoj, la protestantoj ? Kaj samepoke, kion fari kun islamo ?

Poste oni alvenis al la konstato, ke ekzistas pluraj similaj sistemoj, kiujn oni povas nomi "religio". La fakto, ke oni uzas tiun ĉi vorton alportas kun si ofte erarojn en la kompreno de la alia pensmaniero, de la alia mondokoncepto.

La filozofo en la sekvo de metafiziko analizas la priskribon de la mondo, kiun iu religia sistemo uzas por interpreti la observojn, kun la nura helpo de la racio, de la logiko. Sed pri tio ankaŭ ne estas plena konsento,

La sociologo observas kio okazas, ritojn, ceremoniojn, kutimojn kaj leĝojn kiuj rilatas al supozata alia mondo, al dio aŭ dioj, al spiritaj estaĵoj, kaj kiamaniere ĝi efikas en la socia vivo, kiu plejofte ne estas disigita de la religia aspekto. Ne vere interesas la sociologon la signifo, kiun la praktikantoj donas al tiuj praktikoj.

La fakulo pri scienco de religioj zorgas pri interpreto de la simboloj, de la ritoj, de la rakontoj kaj provas trovi komunajn trajtojn, logikojn. Tiu scienca fako interesiĝas prefere pri la religioj sen tekstoj. Ili eĉ ne ĉiam kunsentas pri kio estas ilia objekto.

Tute alia grupo, kiu studas religiojn, estas la ateistoj. Ilia strebo estas pruvi racie en kio religio estas ilo por regi la homojn. Oni konas la formulon atribuitan al Karl Marx : *la opio de la popolo*. Ĉar ili estiĝis en kristanecaj regionoj, ili ĉefe celas kristanisman. Sed, ĉu ili vere estas kapablaj difini tion, kontraŭ kio ili batalas, mi dubas, ĉar ili pruvas, ke ili miskomprenas.

Sed, oni trovas religiajn aspektojn en aliaj homaj movadoj. Mi prenos du ekzemplojn. La unua estas sporto. En ĝi estas ceremonioj, tradicioj, inkluzive de la ekflamigo de la olimpika torĉo, estas la kantoj, himnoj de la subtenantoj en stadionoj, estas la mitologio pri la famaj sportistoj, la preskaŭ privataj domaj

altaroj, kiuj troviĝas ĉe kelkaj kun fotoj kaj memoraĵoj. Oni eĉ parolas pri la dioj de la stadionoj, pri la idoloj.

Pri la alia vi unue dubos. Temas pri Esperanto. Ĉu ne estas mitologio pri Zamenhof, pri Privat, ktp, ktp. Ĉu ne estas himnoj, kantataj de ĉiuj ? Ĉu ne estas rendezuoj, kiel grandaj mesoj, kun iliaj pastroj, oratoroj. Ĉu ne estas kvazaŭ religia espero, foje eĉ ĝis la eskatologia fina venko, ĉu ne estas pilgrimado al kongresoj. Eĉ estas la “sankta signo de l' espero”

Oni same povus trovi aliajn ekzemplojn de kvazaŭ-religioj.

3. La interreligia dialogo

Kio ĝi estas

Kio ĝi ne estas

Kondiĉoj

Mi prefere komencos per la dua demando : Kio la interreligia dialogo nepre ne estas.

Ĝi ne estas la provo konstrui sistemon komunan en kiu ĉiu religio povus esti entenata. La interreligia dialogo ne estas strebo al sinkretismo. Kelkaj ja revas pri tio, sed tio ne estas la interreligia dialogo.

Same, la interreligia dialogo ne estas la naiva penso, ke ĉiu sistemo same validas, ke ĉiu estas vera, aŭ havas parton de la vero.

La interreligia dialogo estas ekkono de la aliaj religiaj sistemoj, studo, reciproka informado, forigo de la antaŭjuĝoj, akcepto de la pasintaj miskomprenoj kaj antaŭeniro al paca kunvivado. Tiu kono kaj akcepto de la alia estas la kerno de la vera interreligia dialogo.

Sekve, estas postuloj, kondiĉoj por

vera interreligia dialogo. Unue, tiu kiu partoprenas devas koni la propran religion. Se ne, li ne povas helpi al la aliaj ekkompreni ĝin. Li devas havi konvinkon pri ĝi. Se ne, kiel la dialogo povus disvolviĝi en plena konfido ? Se vi ne bone konas kaj praktikas vian religion, ĉu ĝi vere estas via religio ?

Dua kondiĉo estas la akceptado de homa kunvivado, la rifuzo de disiĝoj. Unu homo restas unu homo, eĉ se li ne havas la saman kredon, aŭ eĉ se li estas senreligia. Al mi plaĉas multe la esperanta vorto “kunhomo”.

Se ni homoj ne povas konsideri ĉiujn aliajn homojn kiel kunhomojn, ni ne povas partopreni en interreligia dialogo, eĉ simple en bona socio. Cetere, kio validas pri religioj validas ankaŭ pri lingvoj, popoloj, nacioj, ktp.

Por interreligia dialogo kaj ankaŭ por socia vivo, distingo, apartigo inter la homoj laŭ religio aŭ alia antaŭjuĝo malebligas kunvivadon.

En kelkaj landoj, oficiale aŭ ne, disvolviĝis nedogma civila religio, kiu volas kunigi la civitanojn, kiel estis dum la Romia Imperio pagana. Ĉiu rajtis je sia propra religio, sed ĉiu devas sekvi la kulton de la imperiestro.

En Usono, kie neniu religio estas oficiala, ekzistas la civila religio, kiel aperas en la ĵuro pri fideleco, la Unio estas “unu nacio sub Dio”. Sed oni ne diras pri kiu dio temas. La oficialaj preĝoj estas direktitaj al Dio, sen pli da klarigoj. Estis skandalo kiam en iu oficiala preĝo, unu predikisto menciis Jesuon Kriston.

En Francio, dum en la Revolucio oni menciis la “supran estaĵon”. Post la fino

de la deknaŭa jarcento, neniu oficiala mencio eĉ pri nur Dio estas permesata en oficialaĵoj, malgraŭ la ĉeesto de neoficiala longdaŭra plimulto de katolikismo. Sed ekzistas ritoj naciaj, rakontoj naciaj.

Tiu tipo de civila religio (Usono) aŭ de civila senreligieco (Francio) ne havas influon super la eventuala dialogo inter la religioj.

Ekzistas kelkaj institucioj kiuj zorgas pri la interreligia dialogo, apud naciaj komitatoj kunigantaj la religiajn respondeculojn. Estas la t.n. Parlamento de la Religioj.

Estas ankaŭ tiu serio de kunvenoj nomataj laŭ la unua loko, Asizo, post la instigo de la papo.

Ĉiuj diversmaniere agas, cele al pacaj interrilatoj. Sed neniam ili celas al komuna “teologio“, al komunaj “dogmoj”.

La celo fakte, kiam la interreligia dialogo estas serioza, estas reciproka ekkono kaj reciproka respekto. Kaj tio ne estas nenio. Tio valoregas.

4. Kristanismo : ĉu estas religio ?

Jes – Ne

Ĉu kristanismo estas religio ? Kiel vi jam aŭdis, tiu demando ne estas facile respondebla, ĝuste ĉar ne vere eblas doni difinon de kio estas religio. Se oni ne scias kio estas religio, oni ne povas diri ĉu kristanismo estas religio.

Tamen inter la diversaj trajtoj, kiujn oni trovas en la tre diversaj religioj, multaj troviĝas en kristanismo. Mi simple citos, la distingo profana / sankta, la ideo pri alia mondo kaj spiritaj estaĵoj, dogmoj, ritoj, mitoj, leĝoj, profesiuloj, kunvenoj, kantado de himnoj.

Krome, en la populara kristanismo, tiuj praktikoj celas plaĉi al Dio, kaj agadi por ke Dio, aŭ la sanktuloj, kiel subdioj, povus agi favore al la fideluloj.

Se ĉefas en religio la ideo, ke per siaj agadoj, la homoj povas influu super la supernatura mondo, tiam kristanismo, la kristanismo de teologoj, ne estas religio.

Se ĉefas en religio la kvalito de la ritoj kaj praktikoj, kristanismo ne estas religio.

Kristanismo ne celas al kontentiĝo, kvietiĝo de la ĉiela loĝantaro.

La kristana praktiko estas esence dankagado al la agado de Dio, pasinta, aktuala kaj estonta. Neniu kristana teologo pensas, ke eblas devigi Dion fari ion per iu homa rito aŭ konduto.

Kristanismo estas religio en tio, ke ĝi legas la mondon kiel spuron de la agado de Dio. Ĝi estas religio en tio, ke ĝi ligas la homojn al Dio kiel kreinto kaj, ke ĝi ligas la homojn unu kun la alia ĝuste en dankagado kaj laŭdo.

Kaj ankaŭ ĉefe, kristanismo rilatas al kredo ĝuste en Jesuo Kristo.

Kiam en niaj landoj, oni volas mezuri la kristanan kredon, oni erarege faras la demandon : Ĉu vi kredas al Dio ? La respondo al tia demando ne kapablas mezuri kristanismon. Ĝi eble kapablas mezuri teismon, t.e. la fido al iu Dio, granda spirita forto, eble kreinto de la mondo aŭ animo de la universo. Sed tia fido ne estas la kristana fido.

Tradicie, oni nomas kristanismon religio. Kaj tio eble estas akceptebla, laŭ iuj difinoj de religio. Fakte, ĝi portas multajn aspektojn de religio. Tamen, en ĝia fundamento, kristanismo funkcias tute alimaniere ol la aliaj religioj aŭ

religiecaj sistemoj. Funde, kristanismo postulas nenion de la homo, nur ke li/ŝi eniru, akceptu la senpagan donacon de la amo de Dio en Jesuo Kristo. Oni ne serĉas plaĉi al Dio por ion obteni, sed pro la ricevita donaco. Kaj tio ne taŭgas kun unu el la difinoj de religio. La samon oni ankaŭ povas diri de judismo, el kiu fontas kristanismo. “Mi estas la Sinjoro, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco”.

5. La kristanaj disiĝoj

Longa historio

Kiel

Kial

Limoj

Oni ofte diras, ke kristanismo estas nune proksimume dumiljara. Sed tiu aserto estas malprava. En la komenco de la vivo de tiu “vojo”, tiel ĝi nomiĝas en la Nova Testamento, ĝi estis alkalkulata al judismo.

La distingiĝo aperis post sufiĉe longa tempo, kiam la posttempla judismo efektiviĝis kaj ĉefe kiam aperis, ke la plej multaj anoj de la nova vojo ne plu estas deorigine judoj.

Eĉ oni povas datumi la instituciĝo de kristanismo de la edikto de Milano, kiam ĝi fariĝis unue permesata kaj poste oficiala religio de la Imperio.

Tamen, oni povas studi la historion de la “vojo” antaŭ ĝia efektiva aparta vivo oficiala. Ekde la komenco, eĉ ekde la novtestamenta epoko, oni povas konstati, ke neniam, krom eble en la tuj unuaj jaroj, neniam estis plena konsento inter la sekvantoj de la “vojo”. Tio estas legebla en la tekstoj, kaj la tradicio kiu agnoskis

la tekstojn ne forprenis la pecojn kiuj indikas tion.

Estas diversaj faktoroj kiuj povas klarigi, se ne pravigi, la disiĝojn. Estas la distanco, estas la politiko, la gvidantoj realaj aŭ supozataj, kaj ankaŭ la interpreto. Mi simple aludos al du tekstoj: tiu de la Jerusalema kunveno en Agoj 15 aŭ la komenco de la 1a epistolo al la Korintanoj.

Kiam en la pratempoj okazis koncilioj, tio estis pro disiĝoj. Ili estis respondoj al disiĝoj. En 1054 estis la konkludo de jarcentoj de la diversaj tipoj de disiĝoj, politikaj, dogmaj, lingvaj.

Duona jarmilo poste, en okcidento okazis sinsekvo de diversaj krizoj. Dum tro multaj jaroj, politikaj kaŭzoj estigis la ekziston de pluraj samtempaj papoj, ĝis tri. Kaj ĉe la fino de tiu krizo, en Konstanco, efektiviĝas alia krizo komence pri dogmoj, kaj poste ankaŭ denove pri politiko. Tie, en 1415, estis bruligita sur ŝtiparo Jan Hus. La rezulto de tio estas la Reformacio. Tiuj teologoj ne intencis al disiĝo de la okcidenta Eklezio, sed oni elĵetis ilin el la oficiala Eklezio.

Pro enmiksiĝo de politiko, ekestis pluraj militoj, enŝtataj kaj interŝtataj, kiuj rezultis post la tridekjara milito en la Vestfalia paco. Tie tiam oni konstatis en Eŭropo, ke ne eblas solvi religiajn aferojn per milito, kaj, ke diversaj religioj povas ekzisti unu apud la alia sur la kontinento, eĉ, kelkloke sur la sama teritorio.

Ne estas tempo por pli longe travidi la historion. Mi do alvenas al alia evoluo de kristanismo, nun preskaŭ dujarcenta, kion oni nun nomas ekumenismo.

6. Ekumenismo

Kio ĝi estas

Kio ĝi ne estas

Iom da historio

Ekumenismo naskiĝis en protestantaj medioj, pli ĝuste en misiistaj medioj. Vi ja konas la diversecon de protestantismo, malgraŭ ĝiaj multaj komunaj trajtoj.

Sur la misiaj kampoj apudestis diversaj protestantaj konfesioj, alvenantaj el malsamaj lingvoregionoj. Kiel povas aspekti al la lokanoj tiu diverseco ? Ĉu ĝi indikas valoron de tiu nova religio kiun oni alportas al ili ?

Fakte jam en Eŭropo ekestis pluraj interkonfesiaj organizaĵoj, ekzemple por la disvastigo de la Biblio.

Granda konferenco estis organizita en Edinburgo en 1910, kie la delegitoj de la novaj aziaj kaj afrikaj eklezioj pledis por unueco.

Aldone al kelkaj katolikaj streboj al unueco, post la dua mondmilito ekestis la Ekumena MondKonsilantaro de la Eklezioj, kuniĝo de diversaj organizaĵoj kiuj intertempe ekzistis.

Grava en la historio de ekumenismo estas la dua Vatikana Koncilio de la katolika eklezio, kiu komencis agnoski la aliajn ekleziojn oficiale. Pluraj teologiaj problemoj estis solvitaj fine de la 20a jarcento : inter Reformitoj (Kalvinanoj) kaj Luteranoj pri pluraj aspektoj inter ili la Sankta Manĝo. Tio estis la Konkordo de Leuenberg en 1973. En 1982 estis verkita de teologoj el multaj Eklezioj, i.a. katolika, protestantaj, ortodoksaj la Dokumentoj de Lima.

En 1999 publikiĝis la Komuna Deklaro pri pravigo, unue inter luteranoj

kaj katolikoj. Tiuj tekstoj estis poste akceptitaj de pluraj aliaj protestantaj Eklezioj.

En lokoj, kie apudestas pluraj kristanaj konfesioj, okazas renkontiĝoj inter la kredantoj por ekkoni la aliajn, interŝanĝi spertojn, ktp.

Tamen, oni vidas, ke tamen, kristanismo restas diversa, tre diversa. Ĉu malsukceso ? Tio dependas de tio kion oni nomas sukceso.

*Religio estas, kiel aliaj
filozofiaj skoloj,
relegado de nia mondo,
de nia socio, por bona kaj
respektoplena kunvivado.
Tamen tio eblas nur kiam
oni almenaŭ iom konas la
aliajn religiojn, ideojn.*

Kio do estas ekumenismo ? Kiel por interreligia dialogo, kio cetere ne estas alia formo de ekumenismo, la ĉefa afero estas reciproka agnosko, ekkono, kunvivado. Krome ene de kristanismo, estas la ĝojo kune studi la Skribojn, kune preĝi kaj laŭdi Dion, kune porti la Evangelion de Jesuo Kristo, kune helpi la homojn. Estas tiom da aferoj por diri kaj fari kune.

Kontraŭe al ofta penso, ekumenismo ne estas celo al unu sola teologio, unu

sola liturgio, unu sola maniero regi la sistemon. Ekumenismo ne signifas : “la aliaj kristanoj venu al mia pozicio”.

Ekumenismo, kiel interreligia dialogo, implicas, ke la partoprenanto bone konas la vivon, la liturgion, la teologion de sia konfeso. Nur tiel li povas rigardi al la aliaj komprenoj. Nur tiel oni povas alveni al komunaj vortigoj de la propraj komprenoj.

7. Religio en la socio, en la politiko, en la monda vivo

Ĝia rolo, loko

Kiu regas efektive

Religio, individuo kaj socio

Mi preferas paroli pri kio ne estas la rolo de religio en niaj homaj socioj.

Historie, en antikvaj socioj, ĝi havis la centran rolon. Ĝi regis la rilatojn inter la homoj kaj inter la diversaj homaj grupoj. Sed nun, ni vivas en tute alia mondo, kun interŝanĝoj kulturaj, ekonomiaj eĉ genetikaj. Apudestas kulturoj, filozofioj, religioj. Kiamaniere kune vivi en tia situacio ?

Fakte, la rolo de religioj ne estas nenio. Ne kredu tiujn, kiuj asertas, ke religio devas resti io privata, eĉ kaŝita. La religioj havas en niaj socioj gravan rolon, tiun de sprono, de viglanto, de instigo, de denunco. Sed, ili ne havas la rolon devigi la aliajn sekvi regulojn.

Ekzemple, se unu religio malpermesas trinkadon de alkoholo, ĉu vi vere pensas, ke ĝi devas submeti ĉiujn najbarojn same ne trinki alkoholon ? Tio estas nur ekzemplo. Vi povas imagi multajn aliajn.

Kelkaj dirus al mi, ke tio estas eŭropa vidpunkto, okcidenta. Sed, ne estas la vero. Tio estas universalajo, sankciita tra la Universala Deklaro pri la Homaj rajtoj.

Vivi kune kaj apude, diverse kaj respektoplene, tio devus esti la universala regulo. Krom por kelkaj fanatikuloj, tio aperas en multaj religioj aŭ komprenoj de la mondo.

Sed vivi apude kaj kune supozigas reciprokan konon, respekton eĉ estimon. Kaj tio postulas strebon.

La homoj devas strebi ekkoni la kulturon, la religion, la filozofion de la najbaro proksima kaj de la homo pli fora. Tio estas la celo de la interreligia dialogo.

Konstrui unu saman komprenon de la mondo kondukus al nova epoko de sufero kaj subpremo. Oni ne povas trudi sian mondon al la najbaroj aŭ al la foruloj.

Efektive religio estas persona sinteno, rigardo al la mondo, agado en la mondo. Neniu povas devigi ion tiurilate.

Sed religio estas ankaŭ tiu rigardo al la mondo kiu ebligas kompreni, kunsenti, agadi, do partopreni en la socia vivo.

Se religio ne plu estas tiu ligo de la tuta socio, ĝi tamen restas tio kio ligas la anojn al la ceteraj kunhomoj.

Religio estas, kiel aliaj filozofiaj skoloj, relegado de nia mondo, de nia socio, por bona kaj respektoplena kunvivado. Tamen tio eblas nur kiam oni almenaŭ iom konas la aliajn religiojn, ideojn.

La interreligia dialogo estas la kondiĉo de paca komuna vivo en niaj socioj.



Kongresa raporto — 72a KELI-kongreso

Bjalistoko, Pollando, en 2023

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Ĉijare niaj polaj geamikoj invitis nin al Bjalistoko, al la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof.

La temo de nia kunestado estis *Dialogo inter religioj*.

5a de aŭgusto, sabate

Ni alvenis al la plej granda urbo de la nord-orienta parto de Pollando, Bjalistoko, kiu estas la ĉefurbo de Podlaĥia Provinco. Nia kongresejo estis la sidejo de la Ĉefepiskopa Supera Pastra Seminario. La seminario estas duetaĝa konstruaĵo, kie sub la sama tegmento ni havis komfortajn ĉambrojn, manĝejon kaj ni povis uzi du preleg-salonojn, kiuj estis bone ekipitaj per modernaj teknikaĵoj.

Post la vespermanĝo ni havis interkonan vesperon: la partoprenantoj en paroj konatiĝis kaj poste prezentis unu la alian al la publiko. Bone estis renkontiĝi kun longtempaj geamikoj kaj estontaj geamikoj!

Post mallonga konkurso de scio pri Bjalistoko, la tagon laŭ nia kutimo fermis per vespera preĝo, kiun mi (Ágnes Rączkevy-Eötvös, HU) faris, kiel ankaŭ la



Stanisław Dobrowolski, ĉefepiskopo Józef Guzek kaj Jarosław Parzyszek



Philippe Cousson kaj Pavol Petrik

Honoraj gastoj dum la inaŭguro



aliajn preĝojn dum la semajno. Mi dankas la helpon al Albrecht Kronenberger, kiu afable sendis al mi la elektitajn kantojn en pdf-formato, kaj ankaŭ la piano-akompanon, ke ni sen muzikisto povu bone kune kanti.

6a de aŭgusto, dimanĉe

Post la matenpreĝo kaj matenmanĝo ni kolektiĝis en la granda salono feste komenci nian kongreson. Venis saluti nin estroj de la urbo kaj de la diversaj lokaj kristanaj komunumoj.

La enkondukan prelegon faris Philippe Cousson, FR, kun la titolo: *Relego de religio*. Al niaj polaj gastoj tradukis la prelegon al pola lingvo Pavol Petrik, SK.

Poste prelegis Daniel Sjargli, kiu estas la grupestro de Studenta Servo de la loka baptista eklezio en Bjalistoko. Li tre interese rakontis al ni pri la misia agado de bjalistokaj baptistoj en Bosnio, Kenjo kaj Ukrainio. Lian prelegon Jarosław Parzyszek tradukis al ni.

La antaŭtagmezon ni fermis per protestanta Diservo.

Post la tagmanĝo ni iris al la urbo en du grupoj. Tio estis la rutino dum la tuta semajno: unu grupo estis pollingve gvidata de Iza Walentynowicz, la alia grupo estis esperantlingve gvidata de Nina Pietuchowska.

Survoje al kaj inter niaj programeroj ni eksciis multajn interesaĵojn pri la urba historio, pri domoj kaj homoj. Unue ni vizitis modernan ortodoksan preĝejon al la Sankta Martiro Dimitro Solunski. La simpatia juna pastro ankaŭ volonte respondis al niaj demandoj. Poste ni iris al la Centro Ludoviko Zamenhof, kie ni



Vesperpreĝo. Ágnes Ráczkevy-Eötvös



Jarosław Parzyszek kaj Dariusz Szada-Borzyszkowski



Elżbieta Karczewska gvidis malgrandan konkurson

rigardis tre interesan ekspozicion pri Esperanto en Bjalistoko kaj pri la vivo de Zamenhof familio, kaj poste aŭskultis la prelegon de Dariusz Szada-Borzy-szkowski: *Bjalistoko en la koro de ĉiu judo en la mondo*. Tradukis al ni denove Jarosław Parzyszek.

Poste ni promenis tra Bjalistoko, survoje vizitis kelkajn ZEO-jn, inter aliaj la skulptaĵon de la juna Zamenhof.

En la blanka preĝejo apud la granda katedralo ni havis katolikan meson.

Post la vespermanĝo kaj malgranda konkurso de scio pri la vivo de Zamenhof ni rigardis tre interesan filmon *La kazo de Kristo*. Dankon al la granda laboro, fari esperantan subtekston!

Per vespera preĝo ni finis la longan kaj riĉan tagon.

7a de aŭgusto, lunde

Nia lunda tago temis pri la dialogo kun la juda religio: ni havis tuttagan vojaĝon al la urbeto Tykocin, kiu situas proksimume 30 km okcidente de Bjalistoko. Tykocin estas plena de hebreaj spuroj, plejparte bedaŭrinde malgajaj spuroj.

En la belega malnova sinagogo ni aŭskultis unue la prelegon de Jan Maciejewski kun la titolo: *Historio de judoj el Tykocin* – Pavol Petrik tradukis lian parolon.

Poste ni aŭskultis surbendigitan prelegon per E-subskribaĵo de Eljahu Josele: *Kiel iĝi rabeno*.

En la muzeo de la urbeto ni aŭskultis multajn gravajn informojn pri la vivo kaj historio de la loĝantoj de la urbo, kaj judaj kaj kristanaj, kaj superuloj kaj subuloj.

Tuj apud la sinagogo staras la domo,



Sinagogo en Tykocin



Interne en la sinagogo



Solena inaŭguro de nova memortabulo

kie (probable) vivis antaŭ la translokiĝo al Bjalistoko (kaj antaŭ la naskiĝo de Ludoviko) la Zamenhof familio. Ni havis eblecon partopreni festan momenton: ni renkontiĝis ĉe la domo kun la urbestro de Tykocin, Mariusz Dudziński, kaj okazis la solena inaŭguro de nova memortabulo omaĝe al la familio Zamenhof. La urbestro ankaŭ regalis nin per festa tagmanĝo!

Survoje hejmen ni haltis ĉe vilaĝo Pentowo, kiu estas unu el la kelkaj eŭropaj cikoniaj vilaĝoj.

Reenirante al nia kongresejo, al vespermanĝo ni ricevis tradiciajn hebreajn manĝaĵojn. Ili estis tre interesaj kaj bongustaj.

Vespere post mallonga konkurso de scio pri hebreoj ni rigardis filmon “Ida”, kiu gajnis kaj Oscar-premion kaj sep aliajn premiojn.

Ni finis nian interesan kaj enhavriĉan tagon per vespera preĝo.

8a de aŭgusto, marde

Post la kutimaj matenaj programeroj, do preĝo kaj matenmanĝo, mi gvidis Biblian rondon en la malgranda salono. Ĉiuj partoprenantoj elektis kaj legis bibliajn citaĵojn, kiujn mi antaŭe preparis kaj printis sur paperetojn. Ni meditis pri la mesaĝoj, priparolis la signifon de ili kaj kantis, preĝis.

Antaŭ la tagmanĝo en la granda salono ni aŭskultis kvar interesajn prelegojn.

Jaroslav Parzyszek, PL, parolis pri *Hilelismo kaj homaranismo de Zamenhof*, poste Bengt Olof Åradsson, SE, prelegis pri la *Sveda sanktulino Elisabeth*. Janusz Robionek havis prelegon kun la titolo: *Religia vivo en la Eklezio sur la ekzemplo de la Instituto de Fratoj de Kristianaj*



Riĉa kaj festa tegmanĝo en Tykocin



Jaroslav Parzyszek prelegas



Janusz Robionek prelegas

Lernejoj. Fine Gregorio Jekel parolis pri la *tradukproblemoj de Esperanto – Hebrea Biblio.*

Post la tagmanĝo ni per aŭtobuso vojaĝis mallonge al tre interesa loko, al la katolika sanktejo Sankta Akvo en Wasilków. Promenis kun ni tra la sanktejo la paroĥestro, la sankteja kuratoro pastro Alfred Butwiłowski, kaj ni ankaŭ renkontiĝis kun la urbestro de Wasilków, Adrian Łuckiewicz en la paroĥejo, kie ni poste aŭskultis tri prelegojn.

Unue Grażina Barszczewska-Banel, PL, rakontis la interesan historion de la *sanktejo Sankta Akvo*, poste Anna Mocarska, PL, prelegis pri la *Montoj de Krucoj en la mondo*. Fine Nina Pietuchowska, PL, parolis al ni pri la *Malnovritanoj en Pollando*.

Okazis post la prelegoj katolika meso, dum kiu ni, kelkaj KELI-anoj, havis jarkunvenon.

Poste ni havis bonetosan piknikon en la arbaro, ni fritis sur fajro kolbasojn. Hejmenveninte per vespera preĝo ni dankis la bone pasigitan tagon.

9a de aŭgusto, merkrede

Post matenpreĝo kaj matenmanĝo ni denove enbusiĝis – kaj atendis nin nova religio, islamo!

Ni vojaĝis al Kruszyniany, kie plurjarcenta islama komunumo vivas, mirakle gardite sian kulturan, religian, artan heredaĵon.

Post la alveno al la islama Centro de Edukado kaj Kulturo ĉarme salutis nin la prezidanto de la Islama Komunumo Kruszyniany, Bronisław Talkowski.

Unue la imamo Janusz Aleksandrowicz



Gregorio Jekel pri tradukproblemoj



Vespermanĝo ĉirkaŭ la fajro



Anna Mocarska pri montoj de krucoj

prelegis pri tio, kion oni devas scii pri la islama religio. Tradukis al ni Nina Pietuchowska. Estis tre interesa la sekva prelego de Viviana Isernia, IT, kun la titolo: *Kontrasto de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo kaj aliaj religioj*.

Post unika kaj bongusta tagmanĝo kaj vera turka kafo (kun cinamo kaj kardamomo) ni vizitis la malgrandan kaj malnovan moskeon kaj la tombejon.

Revenante al Bjalistoko ni vizitis modernan, novan moskeon, kaj la edzino de la imamo interese rakontis al ni pri ilia vivo kaj kutimoj, tradicioj.

Post la vespermanĝo ni aŭskultis ĉarman koncerton de infan-junulara tatara ensemblo Buńczuk kaj poste ni fermis la tagon per vesperpreĝo.

10a de aŭgusto, ĵaŭde

Ni kiel kutime unue per preĝo dankis la ĵus komencitan tagon kaj poste matenmanĝis.

La antaŭtagmezon ni pasigis en la kongesejo, en la granda salono aŭskultante tri prelegojn.

Unue Jarosław Parzyszek, PL, parolis pri *Protestantoj kaj la historio de la preĝejo de Sankta Adalberto* en Bjalistoko. Poste Jurek Jurczyński, PL, havis prelegon kun la titolo: *Malnovortodoksa Lingvo en ortodoksa preĝejo* ludas similan rolon kiel Esperanto inter esperantistoj tra la urbo. Fermis la prelegserion Oldřich Arnošt Fischer, CZ: *Adaptado de romaoj – dornoplена vojo*.

Poste ni vidis kelkajn mallongajn filmojn: *Dek jaroj de la Esperanto-Libraro*, *Tago de la Gepatra Lingvo*, *La*



Terezia Kurlowicz-Nemere, Ágnes Ráczkevy-Eötvös



En la malnova moskeo



Viviana Isernia

kvaranteno kaj de Roman Dobrzyński *Stelo de Bona Espero* – ĉiuj estis altnivelaj kaj interesaj.

Inter la tagmanĝo kaj la vespermanĝo ni vizitis la urbon, disĝigante en diversajn grupojn, grupetojn laŭinterese.

Vespere donis al ni bonetosan koncerton la klezmer-ensemblo Frey Lech Band.

Ili surprizigis nin per esperantlingva kanto, do ankaŭ mi rapide preparis surprizon al ili! Estis en ilia programo la kanto “hine ma tov uma naim” – kiun ni bone konas, ĉar nia kara frato Albrecht Kronenberg esperantigis tiun al ni, kaj ĝi estas la 856a kanto en nia Adoru! Mi rapide preparis la noton al projekciado, kaj kiam ili finis la koncerton, ni projekciis la noton – kaj kiel fermo de la vespero ni ĉiuj kune, esperantlingve kantis. La kvina strofo estas la origina, hebrea teksto, kaj vere estis kortuŝa momento ankaŭ tion kune kanti.

Per vespera preĝo ni fermis la tagon.

11a de aŭgusto, vendrede

En nia lasta kongresa tago post la matenpreĝo kaj matenmanĝo okazis tuttaga ekskurso por renkontiĝi kun alia religio. Ni iris al la urbeto Supraśl – la Kultura Centro de Ortodoksuloj.

Ni unue vizitis la Muzeon de ikonoj – malfacile trovi vortojn, kiajn belegajn artaĵojn ni vidis!

En la muzeo troviĝas multaj ikonoj kaj aliaj sanktaĵoj, kiujn doganistoj trovis ĉe fiuloj, kiuj provis ilin kaŝite kunporti okcidenten kaj vendi. Okazis, ke oni ne sukcesis trovi la originan posedanton, kaj saĝe decidis montri tiujn valoraĵojn al la



lom da paŭzo inter vizitoj



Roman Dobrzyński pri Stelo de Bona Espero



En ortodoksa preĝejo en Supraśl

publiko, anstataŭ ili estu fermitaj en iu deponejo.

Tion sekvis vizito de la Akademio de Supraŝl kaj filmo *Ĉe la fonto de la monaĥejo en Supraŝl*.

Ni havis gvidatan promenon tra la monaĥejo, vizitis du tre interesajn ortodoksajn preĝejojn.

En la urba biblioteko la urbestro de Supraŝl, d-ro Radosław Dobrowolski salutis nin, kaj la fakulo de la biblioteko montris interesajn aĵojn de la malgranda, sed riĉa ekspozicio pri la historio de la urbeto.

Ni ricevis tre bongustan tagmanĝon en la ĝardeno de la biblioteko, kaj poste ni promenis en la urbeto, trinkis kafon kaj manĝis glaciaĵon.

Dum la tuta semajno ni estis tre bonŝancaj kun la vetero! Neniam estis terure varme, kaj interese nur tiam pluvus, kiam ni havis internan programon.

Post la hejmenalveno kaj la vespermanĝo ni alvenis al la lasta programero: al la adiaŭa vespero. La kongresanoj estis vere aktivaj, do ni havis multkoloran kaj vere amuzigan vesperon per kantoj, poemoj, rakontoj, ŝercoj.

Kaj ni kun ĝojo plenumis nian devigan taskon: danki!


Ni dankis al niaj du entuziasmaj ĉiĉeroninoj, al Iza Walentynowicz kaj al Nina Pietuchowska la senlaca laboron. Ni dankis nian lertan tradukiston Pavol Petrik, kaj ni dankis la funkciigon de la diversaj teknikaĵoj al Antal Pesti.

Ni dankis la organizadan laboron al Stanisław Dobrowolski kaj Jarosław Parzyszek.

Kaj plejparte ni dankis la ideon



Halina Salamon legas poemojn



Desiree Derksen dum adiaŭa vespero



Jurek Jurczyński ricevas informon de Antal Pesti

kongresi en Bjalistoko, la inviton kaj la tutan organizadon al Elżbieta Karcewska.

En nia vespera preĝo ni dankis la tutan sukcesan, riĉan kaj interesan semajnon.

12a de aŭgusto, sabate

Post la matenpreĝo kaj matenmanĝo ni adiaŭis unu la alian, esperante sukcesan hejmenalvenon kaj baldaŭan renkontiĝon.

Ĝis la revido sekvontjare en Vác, Hungario, inter 3a kaj 10a de aŭgusto 2024!

Pri la detaloj vi povos legi en la sekvontaj eldonoj de Dia Regno.

☞

(Fotis Bengt Olof Åradsson, se ne estas alie indikite ĉe la bildo)

Ekumena Diservo dum la 108a Universala Kongreso (29/7–5/8/2023) en Torino, Italio

Kiel kutime dum la UK dimanĉe posttagmeze la 30an de julio 2023 okazis la Ekumena Diservo kiun partoprenis katolikoj, anglikanoj kaj protestantoj. La Diservo okazis en la preĝejo Maria Ausiliatrice (Maria Helpantino), situanta en eduka komplekso de la Salezianoj en Torino.

La Diservon prizorgis Marija Belošević, la prezidantino de IKUE. Gvidis pastro Hatto von Hatzfeld kaj predikis pastro Hubert Michael Schweizer. Biblian tekston legis KELI-ano pastoro Joel Amis el Montrealo.

Ni komune kantis:

‘Laŭdadu, ĉiuj gentoj’ el Adoru 025,
‘Granda Di’ ni laŭdas Vin’ el Adoru 448 kaj
‘Homoj, kantu ĝojo-kanton’ el Adoru 597.



Preĝejo Maria Ausiliatrice.
Fotis Franco56 /Wikipedia, CC3.0

Benata HENGSTMENGEL-KOOPMANS

el Leiden, Nederlando kiu partoprenis la Diservon
kun 2 amikinoj, finnlanda kaj estona.

Vigla interesiĝo en Germana Eklezia Foiro Nurenbergo 2023

Raportas Ulrich MATTHIAS, DE

De la 7-a ĝis la 11-a de junio 2023 okazis en Nurenbergo la Germana Eklezia Foiro (Deutscher Evangelischer Kirchentag) kun ĉirkaŭ 100 000 partoprenantoj. Okaze de ĝi, dum tri tagoj pli ol 500 organizoj prezentis sin kaj sian agadon per informstando en la foirejo de tiu urbo. Bonvenaj estis ĉiuj organizoj, kiuj rilatas al kristanismo aŭ agas por pli bona mondo.

Inter tiuj organizoj estis ankaŭ la germana KELI-sekcio kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ), kiuj aliĝis por komuna stando kaj fine, pro iu miskompreno kun la organizantoj, ofertis du apartajn standojn en la sekcio “libertempo kaj sporto“. Tre bone funkciis la kunlaboro inter KELI, GEJ kaj la lokaj esperantistoj de Nurenbergo.

Ambaŭ standoj trovis viglan interesiĝon, aparte tiu de GEJ, kiu situis pli favore kaj estis gvidata de alloga juna teamo. Ofte informiĝis ĉe ĝi inter 5 kaj 10 homoj samtempe. Entute ni renkontis ĉe niaj standoj 20 esperantistojn kaj informis pli ol mil interesatojn el deko aŭ eĉ

dudeko da landoj. Kiel ĉefan sloganon, ni uzis “Esperanto – Weltsprache der Herzen“ [Esperanto – mondlingvo de la koroj]. Tiu ĉi slogano memorigas ekz. pri princino Diana, kiu konstatis, ke ŝi neniam estos reĝino, kaj deziris esti “reĝino de la koroj“. Ĝi montriĝis tre taŭga pro tio, ke foje interesatoj aliris nian standon per la vortoj “Esperanto – tio ja iam celis fariĝi mondolingvo, ĉu ne?“. Nia slogano donis al ni bonan okazon paroli pri la nuntempaj celoj kaj avantaĝoj de Esperanto, kaj samtempe memorigas nin esperantistojn, ke ni klopodu havi amindan lingvan komunumon.

Pluraj intersatoj tuj aĉetis lernolibrojn, vortareton aŭ la Diservan libron ADORU. Iuj interesiĝis pri la venontjaraj Bibliaj Tagoj en Neustadt aŭ la venontjara Universala Kongreso en Tanzanio. Restas en nia memoro multegaj tre agrablaj interparoloj, ekzemple kun iu virino, kiu adiaŭis nin per la sekvaj vortoj: “Mi tre ĝojas, ke mi trovis vian standon, ĉar nun mi decidis lerni Esperanton.“

☞



Vigla interesiĝo ĉe la stando de GEJ (kie tamen ankaŭ la KELI-Sekcio estas menciita sur la bendo)



Heinz Sprick informas interesatojn ĉe la stando de KELI



Mi nomiĝas s-ro Dismas Robert Kusaya. Mi loĝas en Bunda urbeto, nordorienta Tanzanio, tre proksime al Serengeti parko kaj Viktoria lago 12 km for de la urbeto. Mi estas la sesa infano en la familio, kiu enhavis naŭ gefilojn. Miaj gepatroj estis man-terkultivantoj kiuj malriĉe vivis.

En 1981 mi ekvizitis lernejon, la unuan klason kaj en 1987 mi finlernis la sepan klason, kiu estas la lasta klaso de la elementa lernejo en Tanzanio. Bedaŭrinde mi ne povis daŭrigi studadon pro tio, ke miaj gepatroj tute ne povus pagi por mia studo.

Mi iĝis kristano ekde la jaro 1996 kaj en 2004 mi ekservis kiel loka preĝeja pastro. En 2013 mi forlasis la preĝejon kaj fondis alian en la sama urbeto kie mi deĵoras kiel pastro. En 2019–2020 mi alligis en la Biblia

kolegio nomata NEW LIFE OUTREACH LEADERSHIP ACADEMY en Arusha Tanzanio, kie mi diplomiĝis kaj ricevis atestilon pri Teologio kaj Socia Disvolvigo (angle: Theology & Community Development). Mi ankaŭ studis mallongan kurson pri Biblia Konsilo (angle: Biblical Counseling) kaj ricevis atestilon.

Do mi servas kiel pastro kaj biblia konsilanto al junuloj kaj paroj pri psikologiaj aferoj, vivoj, laboro, k.t.p por helpi ilin vivi decajn vivojn, kiuj plaĉas al Dio kaj ĝenerale en la socio por plibonigi siajn vivojn fizike kaj spirite.

Se iu interesiĝas kun mia artikolo jen mi donas mian retposton ke povas atingi min, demandi aŭ kunlabori kun mi. Mia nomo estas Dismas Robert kaj mia retpoŝto estas dismasrobert72@gmail.com aŭ dismakusaya@gmail.com.

Dismas Robert Kusaya



Organizanto:

Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a.
Prezidanto: pastoro Wolfram Rohloff,
Am Marktplatz 82,
D-09496 Marienberg-Zöblitz

Partopren-kotizoj:

La prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en 2-lita ĉambro (surteraj litoj) kun duŝo/necesejo, ekskursiva programo 260 €, post 2023-10-30 270 € por ĉiu persono.
Rabatoj: Loĝantoj en eksterlando -65 €, en Germanio loĝantaj KELI-membroj -25 €. Krompago por 1-lita ĉambro (entute): +40 €.

Programo

Teologia temo: “En la komenco ...” (1a Moseo 1.1) – Aŭ “Dialogoj pri senco kaj celoj de nia homa vivo laŭ la komencaj 11 ĉapitroj de la Biblio” (Wolfram Rohloff). Komuna preĝado kaj kantado per “Adoru” (muzika kadro: Stefan Lepping). Jaŭdon ĝis sabato: Turimaj ekskursoj (Ulrich Matthias). Aktualajn detalojn vidu en la Interreto: www.esperanto.de/keli.

Nia kunvenejo

Palatina junulargastejo,
Hans-Geiger-Strasse 27,
D-67434 Neustadt an der Weinstrasse.
☎ 0049 6321 2289
www.jugendherberge-neustadt.de

Kondiĉoj de aliĝo

Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 30 € por ĉiu persono kaj estos konfirmata post ricevo. La reston de la kotizo nepre ĝiru ĝis la **10a de januaro 2024**. Aliĝoj post tiu dato nur eblos, se ni ricevos pli da lokoj.

La antaŭpago estos repagebla, se vi aligas anstataŭanton (samseksan). Tiu, kiu nur pro financaj kaŭzoj ne povus partopreni, petu subvencion de la Fondaĵo de Familio Fischer.

Ajnajn demandojn kaj petojn direktu al la

komisiito por organizado kaj financoj

Rudolf Fischer, Amtmann-Daniel-Str. 11c, D-48356 Nordwalde
☎ 0049 2573 / 626 und 0049 151 5133 6794
✉ fischru@uni-muenster.de

Bibliaj Tagoj
en Neustadt an der Weinstraße
de 2024-03-13 ĝis 2024-03-17
(merkredo - dimanĉo)



Jen mi aliĝas definitive al la Bibliaj Tagoj
de 2024-03-13 ĝis 2024-03-17 en Neustadt.

(titolo+)nomo: _____

strato/domnum.: _____

kodo, urbo: _____

telefono: _____

poŝtelefono: _____

retpoŝta adr.: _____

membro de KELI kun "Dia Regno" jes ne

vegetarano / laktozo / ceteraj limigoj _____

Mi jen mendas 2-litan ĉambron kune kun:

Nomo: _____

vegetarano / laktozo / ceteraj limigoj _____


La sumon de _____ € mi ĝiris je
_____ (dato)

al la sekvanta konto:

Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel
IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC GENODEF1EK1

UEA-konto de Rudolf Fischer: rfiis-w

Rimarkigoj / proponoj:

**Bv. sendi la suprajn datumojn poŝte aŭ
elektronike al:**
D-ro Rudolf Fischer, Amtmann-Daniel-Str. 11c,
D-48356 Nordwalde, Germanujo
 fischru@uni-muenster.de



Informetoj

Saluton, karaj kolegoj de, KELI!

Atingis la Centran Oficejon de UEA papera letero sendita de esperantista pastoro el Benino, S-ro Anku Idiébi Sakama. Li ŝatus esperantlingve korespondi kun "pastoroj, evangeliistoj kaj apostoloj eskterafrikaj (precipe svisaj, germanaj kaj amerikaj)". S-ro Anku agadas kadre de Mission Pentecotiste aŭ Benin (laŭ mia kompreno novpentekostisma eklezio), sed interesiĝas pri korespondado kun kristanoj el diversaj tendencoj.

Jen liaj kontaktodatumoj:

Pastoro Anku Idiébi Sakama

Telefonnumero: +229 9526 2777 (WhatsApp)

Poŝtadreso: BP 381, Ouidah, Benino

Mi petas de vi la komplezon disvastigi la peton al eventualaj interesatoj!

Amike kaj antaŭdankante,
Miĥaelo Bento
oficisto de UEA

En Kristo estas kaŝitaj ĉiuj
trezoroj de saĝeco kaj de scio.

Kol 2,3

Vi vidas min, mia Di'

DU BIST EIN GOTT, DER MICH SIEHT • laŭ Gen 16,13

3-voĉa aŭ 6-voĉa rondkanto

Vi vi - das min, Vi vi - das min,
germane: Du bist ein Gott, du bist ein Gott,

Vi vi - das min, mi - a Di', mi - a Di'.
du bist ein Gott, der mich sieht, der mich sieht.

Vi vi - das min, mi - a Di', mi - a Di'.
Du bist ein Gott, der mich sieht, der mich sieht.

*Gen 16,13 (Hagar ĉe akva fonto en la dezerto):
Kaj la Eternulon, kiu parolis al ŝi,
ŝi nomis: Dio-kiu-min-vidis; ĉar ŝi diris:
Ĉi tie mi vidis Tiun, kiu min vidas;
kaj ĉu mi poste vivas?*

*KRISTANAJ FONTOJ > SPIRITAJ IMPULSOJ > ĈI-JARA VORTO (2023):
Vi estas Tiu, kiu min vidas.*

DU BIST EIN GOTT, DER MICH SIEHT • germana T: laŭ Gen 16,13 (jara devizo
2023) • M: © Matthias Grünert en TV-Diservo el la Sinjorina Preĝejo en
Dresdeno, ZDF 2023-01-01 • E: Albrecht Kronenberger 2023-01-01